

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



E N H A V O

	Paĝo
* * * — Oktobro lumas	1
Canko Murgin — Historia postulo de nia epoko	2
Mih. Langov — Pri la „interna ideo“	4
Ilio Andreev — Imitinda ekzemplo	5
Ljudmil Stojanov — Ĉio estas perdita krom la honoro	6
Sergej Esenin — * * *	6
Ĥristo Smirnenski — Johano	7
Atanas D. Atanasov — ADA — Kurso por lingva perfektigo	8
K. Kvist, R. Windol — Letero el Svedio	10
Violin Oljanov — Denove pri la organiza stabiligo	11
C. Fielding — La fakkunveno de MEM-dum la 46-a UK de Es- peranto	13
TRA LA GAĴETARO	13
ORANIZA VIVO	15
NI RECENZAS .	17
DEZIRAS KORESPONDI	18



Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.

Reklamtarifo: 5 levoj por cm²; korespondanoncoj: 0,5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera koverilpaĝo — 1000 lv.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5

SOVETUNIO: J. Kudrjavickij, PK 1255 Moskva K-9.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

Frontpaĝa bildo: Turista Esperanto-grupo el Levskigrad ekskursas tra la Balkanmontaro.



OKTOBRO LUMAS

Antaŭ 44 jaroj hele eklumis la suno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Sub ĝiaj radioj kreskis, malgraŭ atakoj de imperiistoj, la nova homo en USSR. Jaron post jaro la unua en la mondo ŝtato sen kapitalistoj kaj sen reĝo altiris la simpatiojn de la ekspluatata homaro. Por sufoki la idon de la revolucio, la faŝistoj, helpante de mondkapitalo, preparis grandegan sangon militon kontraŭ la socialisma lando. Kaj la rezulto? — Nun la suno de Oktobro radlas sur vastajn teritoriojn de rivero Elbo ĝis Pacifiko. Milionoj da sklavoj en Afriko kaj Sud-Ameriko sekvas la ekzemplon de la rusa popolo — batalas kontraŭ la subpremantoj por libera, sendependa kaj feliĉa vivo.

Popolo, naskinta konkerantojn de la kosma spaco, ne timas frakvestitajn kanibalojn, kiuj minacas ĝin per raketoj kaj atombomboj. Tiu popolo rekte kaj nedeflankigante iras sian vojon al la komunismo. La saĝa partio de Lenin ellaboris dum sia 22-a kongreso grandiozan programon por konstruo de komunisma sociordo. Trafe oni komparas ĉi-dokumenton kun la „Komunista Manifesto“, per kiu antaŭ 130 jaroj Marks kaj Engels montris al la laborista klaso vojon kaj rimedojn por savi sin el la katenoj de ekspluatado.

Kiom da viktimoj estas faritaj por la revo de la homaro — la komunismo! Kiom da sango estas versita en ĉiu angulo de nia terglobo! Kaj jen — dank' al la soveta popolo ĉi-revo jarmila efektiviĝas! Jes, la komunismo venkos definitive, kaj tiam por unu miliardo da homoj ekzistos senklasa sociordo, en kiu abundos viv rimedoj. Tiam ĉiu homo vivos bonstate kaj feliĉe.

La nova programo de Komunista Partio de Sovet-Unio proksimigas la tempon, kiam la minacoj de la frakvestitaj kanibaloj apenaŭ aŭdiĝos, ĉar la ĉefa tasko de la soveta popolo estas konstruadi komunismon en paco. Realigo de la programo ĉiurilate fortigos Sovet-Union kaj la mondsistemon de socialismo. La finvenko de komunismo savos la homaron de neniigaj militoj. Kaj tiam oni benos la tagon, en kiu eklumis la suno de la Granda Oktobra Revolucio!

Ni, bulgaraj esperantistoj, kiuj ĉiujare solene festas la datrevenon de la Oktobra Socialisma Revolucio, kune kun la tuta bulgara popolo, plenkore apogas la sovetan potencon en ĝia strebo al komunismo kaj eterna paco inter la popoloj.

Vivu kaj progresu la granda avangarda sovetpopolo!

HISTORIA POSTULO DE NIA EPOKO

La Granda Oktobra Socialisma Revolucio frakasis unu el la grandaj koloniimperioj — la cara Rusio. Per tio ĝi naskis belajn esperojn pri baldaŭa liberigo de la subigitaj popoloj kaj donis flugilojn al iliaj revoj. Ekŝtis profunda krizo en la kolonia sistemo de la imperiismo.

Dum kaj post la Dua Mondmilito la naciliberiga movado en la kolonie subigitaj landoj kreskis en granda skalo. La ritmo de disfalo kaj likvido de la koloniismo estis tro rapida precipe en la kontinentoj Azio kaj Afriko. En 1939 proksimume 8,9 milionoj da kvadrataj kilometroj (20%) de la teritorio kaj 558 milionoj da loĝantoj (47%) de la loĝantaro de Azio (sen Ĉinio) vivis sub koloniisma jugo. En la fino de la Dua Mondmilito la sklavigitaj popoloj el la Oriento ekbatalis en granda skalo pri sia nacia liberigo kaj iuj el ili sukcesis reakiri sian liberecon kaj nacian sendependecon.

Liberigis la „perlo de la brita regkrono“, kiel tiutempe oni kromnomis Hindion. Liberigis ankaŭ Indonezio, Birmo, Cejlono, Kambogo, Laoso, Irako, Sirio, Libano ka. En niaj tagoj proksimume 3% (1,3 milionoj da kvadrataj kilometroj) de la teritorio kaj 1% (10 milionoj da loĝantoj) de la loĝantaro de Azio daŭre spiregas sub la premo de la koloniisma reĝimo. Nur Japanio kaj Francio perdis ĉiujn siajn koloniojn en Azio. Britlando sukcesis reteni siajn poziciojn en iuj arabaj landoj, en Singapuro, Hong-Kongo, Norda Borneo, Saravako ka. Nederlando retenis Okcidentan Irianon kaj Portugalio — insulon Timoro kaj siajn antaŭajn koloniojn sur la teritorio de Hindio.

Tamen en intereso de la vero ni devas konfesi, ke vico da liberigintaj landoj en Azio, kiel Pakistano, Suda Vietnamio, Suda Koreo, Malaja Federacio, La Filipinoj ka., havas nur formalan sendependecon, sed fakte ili

estas en stato de duonkoloniisma reĝimo.


Jam pli evidentan ekzemplon pri la disfalo de koloniisma sistemo disponigas al ni Afriko. Antaŭ la Dua Mondmilito en ĝi troviĝis nur du liberaj landoj (Liberio kaj Abisenio) kaj unu dominio de la Brita Imperio (Sud-Afrika Unio). Post la milito kaj precipe en la lastaj kelkaj jaroj en Afriko liberigis preskaŭ 30 landoj el sub la jugo de la britaj, francaj kaj belgaj imperiistoj. Tamen eĉ nun proksimume unu triono de la teritorio kaj unu kvarono de la loĝantaro de Afriko suferas sub la soldatbotoj de la anglaj, francaj, belgaj, portugaliaj kaj hispanaj imperiistoj.

La plej granda koloniposedanto en Afriko estas Britlando. Ĝi posedas 3,8 milionojn da kvadrataj kilometroj kun 30 milionoj da loĝantoj kaj estas sekvata de Francio kun 3,3 milionoj da kvadrataj kilometroj kaj 11 milionoj da loĝantoj, de Portugalio kun 2,1 milionoj da kvadrataj kilometroj kaj 12 milionoj da loĝantoj, kaj de Hispanio, Sud-Afrika Unio kaj Belgio. •

Kolonioj tamen estas ne nur en Afriko, sed ankaŭ en Azio, Oceanio, en Ameriko kaj eĉ en Eŭropo (Gibraltaro, Malto kaj Spicbergo).

Nun la koloniaj teritorioj ampleksas 11% de la loĝebla parto de kontinentoj kaj la loĝantaro de la kolonioj ampleksas pli ol 2% de la tuta homaro. Tiuj ciferoj montras, ke en la lastaj du jardekoj (1940—1960) la koloniismo estas devigita cedi sian lokon sub la suno al aliaj pli progresivaj fortoj. Sed eĉ hodiaŭ ĉirkaŭ 70 milionoj da homoj estas subpremataj de la avidega kaj nesatigebla imperiismo. Pretigas siajn batalvicojn ankaŭ la popoloj de Tanganjiko, Kenjo, Rodezio, Angolo, Mozambiko, Omano ka.

La imperiistoj ege malkontentas pro la perdo de „siaj“ kolonioj. Ili ne konsentas kun la kreita liberiga situacio



1935

kaj pro tio ili klopodegas fiaskigi la penon kaj la strebon de la naciliberigaj movadoj, kiuj estas subtenataj de ĉiuj progresemaj homoj en la mondo. Ili pasie batalas ne nur por reteni tion, kio restis al ili, sed ankaŭ reakiri siajn perditajn privilegion kaj dominon en la jam liberigitaj kolonioj kaj dependaj landoj. Nur tiel oni povas kontentige klarigi la devenon de vico da arogaj agresmilitoj kontraŭ Norda Koreo (1950—1954), kontraŭ Vietnamio (1946—1954), kontraŭ Gvatemalo (1954), kontraŭ Egiptio (1956), kontraŭ Kubo (1961), kontraŭ Alĝerio, kiu furiozas ankaŭ nun. Pro Usona interveno ankoraŭ ne estas restarigita la paco en Laoso.

Por efektivigi sian infere sklavigan intencon, la imperiistoj uzas eĉ la mal-kaŝajn teroragojn. Estas freŝaj ekzemploj tiurilate. Tiumaniere ili mortigis S. Bandaranajke, Ministro-Prezidanto de Respubliko Cejlono, P. Lumumba, Ministro-Prezidanto de Kongolando kaj eminentajn gvidantojn de Kameruno, Ugando ka. Ili faris provon mortigi la Prezidanton de Indonezio — Sukarno, la Ministro-Prezidantojn de Irako — Kasem kaj de Kubo — Fidel Kastro ktp.

Timantaj la kreskon de naciliberigaj movadoj, la malnovaj koloniposedantaj landoj (Anglio, Francio, Belgio, Portugalio, Nederlando, Hispanio, Sud-Afrika Unio ka) petas helpon de Usono por



1961

daŭrigi sian dominon kaj ekspluatadon en la jam ekribelintaj kolonioj. Laŭ tiu maniero iliaj kolonioj fakte fariĝas kunposedaĵo de Usono kaj la koncerna koloniposedanta lando. Kelkaj ĵus liberigitaj landoj estis ekonomie subigitaj de Usono kaj ili transformiĝis en usonaj duonkolonioj. Tiaj landoj estas Suda Koreo, Suda Vietnamio, Tajlando, La Filipinoj, Gvatemalo ka. Estante savanto de imperiisma kolonisistemo, Usono fakte transformiĝis en grandan kolonian imperion.

Malgraŭ tio, neniu kapablas haltigi la liberigan marŝon de la subigitaj popoloj. Neniu kapablas revivigi la pereantan kolonisistemon de imperiismo. La liberigo de la kolonie subigitaj landoj ne estas sen zigzagoj, tamen ĝi montriĝas kiel nevenkebla forto, kiu frakasas ĉiujn barojn sur sia vojo. Ruiniĝas kun granda krako la jarcenta reĝlando de la sklaveco. Dum la nun okazanta XVI-a sesio de la Asembleo de Unuigitaj Nacioj Sovet-Unio proponis, ke oni likvidu la koloniismon ĝis la fino de 1962. La problemo pri kompleta neniigo de la imperiisma kolonisistemo estas starigita en la tagordo de la vivo mem kaj nun la popoloj havas la parolon...

La definitiva pereco de koloniismo neeviteble alvenas. Ĝi estas historia postulo de nia glora epoko.

Canko MURGIN

PRI LA „INTERNA IDEO“

Konekse kun la decidoj de la Plenkunsido de CK de BEA pri la ideologia edukado de bulgara esperantistaro, la estraro de Sofia Esperantista Societo „Maksim Gorkij“ okazigis kelkajn interesajn prelegojn. Per unu el la prelegoj oni klarigis kaj diskonigis al la sofiaj geesperantistoj la decidojn de la Pleno kaj la taskojn, kiuj staras antaŭ ni rilate al la ideologia edukado. Oni klarigis ankaŭ la erarajn ideajn konceptojn de Zamenhof, speciale la tiel nomatan „internan ideon“.

La klarigo pri la esenco de la „interna ideo“ estis absolute necesa kaj nepra, ĉar la „interna ideo“ kuŝas kiel fundamento de preskaŭ ĉiuj religioj kaj idealismaj filozofiaj teorioj. Ĝia esenco estas metafizika kaj mistika. La iamaj kaj nunaj teologiistoj kaj pastroj asertis kaj emfazis, ke la „interna ideo“ pri dio kaj dia amo estas denaska, enmetita, injektita de supera forto, nomata dio. Kaj la dialektika materiismo instruas, ke la aktiveco de la homo karakterizas sin nur per cel-direktiteco determinata de la objektivaj kondiĉoj de la ekzistado de la homo. La marksismo-leninismo, surbaze de sciencaj argumentoj, absolute neas la ekzistadon de ia dio, konsiderante la religion kiel opion por la popoloj. Estas do tute evidente, ke la tiel nomata „interna ideo“ havas nenian scien-canvaloron. Zamenhof donis al ĝi nur esperantan formon kaj aspekton.


La homaranismo estas variaĵo de la burĝa kosmopolitismo. La homaranismo estas doktrino postulanta, ke ĉiu amu ĉiulandajn homojn kiel siajn fratojn. La homaranismo celas konstrui ian mondsocion, surbaze nur de la amo al ĉiuj homoj. Tiu doktrino ne nur havas nenion komunan kun la proleta internaciismo, sed ankaŭ ĝi estas antagonisma al la marksismo-leninismo. Oni ne povas ja krei solidan kaj daŭran amikecon inter la popoloj, surbaze de sendiferenca amo al ĉiuj homoj. Ĉu

eblas amo kaj amikeco inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj en la kapitalismaj landoj? Inter koloniigistoj kaj kolonilgitoj kaj ĝenerale inter la imperiistoj kaj la laborista klaso? Nature kaj logike, tute ne! Aserti la kontraŭon, estus mistifikajo.

Malaprobante la tiel nomatan internan ideon de Zamenhof, ni tute ne subtaksas lian grandiozan kreaĵon — Esperanton. La fratoj Ĉirilo kaj Metodio ankaŭ kreis antaŭ centjaroj la slavan alfabeton. Ili estis samtempe apostoloj de la kristanismo inter la slavaj popoloj. Sed ne pro tio ni celebras kaj glorigas ilin. Ilia revolucia ago konsistas en la kreo de la slava alfabeto, kvankam ili tiam propagandis per ĝi la kristanisman.

La samo validas ankaŭ pri Zamenhof. Li kreis solidan, bonegan interkomprenilon por la popoloj de la tuta mondo. Per ĝi ni povas diskonigi kaj interŝanĝi la kulturajn valorojn de la diversaj popoloj, plifaciligi kaj akceli la amikecon inter ili, batali per ĝi kontraŭ la milito kaj por la paco. La propraj kaj individuaj konceptoj kaj ideoj de Zamenhof estis lia propra afero. Ni akceptas kaj heredas de li ĝuste Esperanton, la ĉefverkon, kiu, laŭ sia esenco kaj celo, estas progresema kaj revolucia.

M. LANGOV



Lernilo pri historio

IMITENDA EKZEMPLO

Unue en la mekanika sekcio de la Ŝtata Maŝinkonstrua Uzino oni ekparolis pri Esperanto. Tie estis malfermita la unua kurso. Poste naskiĝis la ideo pri starigo de esperanta sekcio en la kadroj de la urba societo.

La esperantistoj en la sekcio laboras en diversaj fakoj, sed ili ĉiuj kontribuas la plenumon de la sekcia plano.

Unu el la esperantistoj, kiu prizorgas ĉiaman bonan funkciadon de la sekcia maŝinaro estas k-do Petro Kitanov. Li estas tornisto en la ripara fako de la uzino kaj de la ĝustatempa prilaboro de la maŝindetaloj fare de li en granda skalo dependas la plenumo de la ĝenerala produkta plano. Li bone komprenas tion kaj modele aranĝis sian laboran lokon, kio ebligas rapidan kaj kvalitan plenumon de la taskoj.

Por ekscii, kiel li solvis la problemon, mi foje vizitis la kamaradon ĉe lia labora loko kaj faris kun il mallongan intervjuon. En la interparolo li rakontis jenon:

— Ĉe ni estas prilaborata plej ofte aparta detalo. Pro tio ni devas bone aranĝi nian ilaron por perdi malmulte da tempo en agordigo de la maŝino. Tio dependas de la anticipa preparo de tornotranĉiloj, mezuriloj kaj akcesoraj instrumentoj. La ŝranketon, en kiu estas mia ilaro, mi aranĝis jene: la mezuriloj estas plej supre kaj ili ĉiam estas pretaj al laboro. Sur la subaj bretoj estas la tornotranĉiloj kaj la aliaj instrumentoj. Ĉiu tranĉilo estas ekipita per lamenoj. Tio ebligas al mi tre rapidan establighon de la tranĉilo sen perdo de superflua tempo, ĉar mi laboras, kiam estas necese. Pro tio ni plene devas utiligi nian tempon. Ni bone prizorgas ilin kaj ni havas titolon „Brigado de socialisma konservado de maŝinoj“.

— Vi tuŝis la demandon pri la brigadoj — mi interrompis lin.

— Ĉu via brigado konkuros por ricevi titolon „Brigado de modela socialisma laboro“?

— Bedaŭrinde, ne! Nia brigado estas malgranda kaj laŭ la reguloj, ĝi ne povas konkuri por tiu titolo. Ni estas nur kvar personoj, kaj en brigadoj, konkurantaj por tiu titolo, la anaro devas esti ne malpli ol ses personoj. Antaŭe, kiam la laboristoj ne estis kvalifikitaj kaj okazadis pli da averioj, nia brigado havis tiun nombron kaj tiam ni ricevis titolon „Brigado de komsomola laboro“, sed dank’ al la perfektigo de la laboristoj nia laboro malpliigis kaj du membroj de la brigado transiris al alia laboro. Ni dankas la konsciencajn kamaradojn, kiuj alkitimigis priservi kaj prizorgi bone la maŝinojn.

Je la fino de nia interparolo mi demandis la kamaradon, ĉu li legas esperantajn revuojn kaj kion li dezirus legi en ili.

— Mi ankoraŭ estas nova esperantisto — li respondis, — kaj ne tiom bone mi posedas la lingvon, sed de tago al tago mi perfektigas. Foj-foje mi enrigardas la gazetojn kaj ili plaĉas al mi, sed estus ege pli bone, se oni aperigus materialojn por novaj esperantistoj. Ni ne havas Esperanto-bulgarajn vortarojn kaj mi opinias, ke oni povas aperigi ĝin sur la paĝojn de „Bulgara Esperantisto“. Tio grave helpus al ni. Ankaŭ teknikajn terminojn kaj artikolojn mi dezirus vidi en „Bulgara Esperantisto“, aperigo de teknikaj terminoj estas urĝe necesa. En nia sekcio estas kelke da esperantistoj, sed pri nia laboro ni ne povas paroli en Esperanto kaj oni ofte primokas nin. Mi opinias, ke oni bezonas teknikajn revuon por pruvi antaŭ la skeptikuloj, ke Esperanto ne estas vana okupo, sed ĝi estas serioza entrepreno. Mi deziras, ke tio realigu en baldaŭa estonto.

Post la interparolo mi disiĝis kun k-do Kitanov, ekdezirante al li ankoraŭ pli bonajn sukcesojn en lia laboro kaj en ekposedo de la lingvo.

Illo ANDREEV

ĈIO ESTAS PERDITA KROM LA HONORO

Ljudmil Stojanov

— Vi vidas, Ibrahim'-agao, ke akciproj kaj falkoj forflugas el siaj nestoj kaj revenas kun rabajo por siaj idoj. Ĉiuj homoj estas infanoj de Alaho, kaj Alaho ordonis al ili vivi frate — kiu havas pli ol necese, tiu donu al homoj, posedantaj nenion. Bone, sed ĉu efektive oni observas tiun ordonon? Ĉu la homoj, kiuj posedas sufiĉe, ne aspiras pliriĉigi sin ankoraŭ pli, forrabi la lastan moneron de la malriĉulo? Al kiu vi servas, se ne al la rabantoj, al homoj, kiuj tute neglektas la leĝon de Alaho?

Tiu ĉi longa parolado estis farita per klara kaj sonora voĉo, kaj dume Karà Ibrahim per fingroj ŝtopis al si la orelojn, por ne plu aŭdi...

— Kion do vi volas ankoraŭ? Ĉu vi ne vidas, ke via sorto jam estas decidita?

Sekvis respondo:

— Mia sorto povas esti decidita,

sed la via ankaŭ ne ŝajnas pli bona... Tia tempo venis, Ibrahim'-agao, ke homo, kiu ne posedas havaĵon, prenos de tiu, kiu posedas, se ne per konsento, nepre per forto — tion diras al mi mia malbonŝanca kapo kaj ĝi ne trompas min...

— Vidu nur, al kia danĝera situacio kondukis vin tiu ĉi via malbonŝanca kapo!...

— Povas okazi, ke ĉio estos perdita por mi, Ibrahim'-agao, tamen nur la honoro estas savita — la honoro de Mehmed Sinap...

Karà Ibrahim sponis la ĉevalon kaj retroiris ankoraŭ kelkajn paŝojn. Mehmed Sinap jam estis ekgalopinta al la prefektejo kaj malaperis en la fumon de la incendio.

En la libro „Mehmed Sinap — Historio de unu Ribelo“.

Tradukis: Iv. SARAFOV

S. Jesenin

* * *

Estiĝis la ruĝ' sunubira,
plektbariloj dormetas sub lun'.
Mia blanka kaban' ne spiru,
ke en solo ni restos de nun.

Lun' en pajlan tegmenton enŝovis
kornojn, kiujn ĉirkaŭas la blu'.
Mi ne sekvis post ŝi kaj ne provis
eĉ aspiro al la rendevu'.

Scias mi, ke doloro senlima
malakriĝos kun tempa forir'.
Belan buŝon kaj ĉastan animon
por alia, gardadas ŝi, vir'.

Senfortuloj pri ĝojo nur petas,
fieruloj do vivas en fort'.
Kaj alia ŝin ĉifos kaj jetos
kiel senutilaĵon el kort'.

Jam blovos neĝvento sovaĝa,
mi ĉe fajro ekrevos pri am',
kaj ŝi venos al nia vilaĝo
sian idon varmigi ĉe flam'.

Ŝi ŝafpelton kaj ŝalon detiros,
kaŝros apud mi ĉe fajrobrul'
kaj kviete kaj milde ŝi diros,
ke similas al mi la etul'.

Tradukis: B. Kolker

Johano

Aristo Smirnenski

Vespere super eta domĝarden'
malpletkis nigrajn buklojn el malhel'.
Johano malfermetis dum moment'
la pordon kaj al strata dormsilent'
rigardis kaj ekiris al la cel'.

Postkuris lin virin' ploranta kun
infan' malgranda sur patrina sin'.
Sed, lumigate de la pala lun',
forpasis li senbrue tra l' mallum'
kaj ĉio silentiĝis en la fin'.

Kaj longe, longe tien al la for'
rigardon revan fiksis ŝi kun am',
ĉirkaŭe regis dormo kaj horor'
kaj sole lipoj palaj kun angor'
en ploro flustris nur: „Johan', Johan'!“

Kaj tra Berlin' droninta en malvarm', —
en prujn' kaj bluarĝenta bril' de lun',
subite eĥis pafado de alarm'
kaj ĝia son' reeĥis tondre jam,
ŝirinte la silenton de l' mallum'.

Kaj pafado dua, tria sekvis ĝin...
Berlin' ektremis en terur' kaj ĝem'.
La nokt' pleniĝis per alarma kri'
kaj langojn ruĝajn levis l' incendi'
brilante kun la brilo de ruben'.

Ĉe l' barikado staris jam Johan',
kaj nekonata restis lia nom'.
Proksime ĉe maljuna veteran',
kun palmien' kaj frostiĝinta man'
pafadis li kun batalema ŝtorm'...

Kaj korp' ĉe korp' en mortbatalo ĉi
sin sternas; tontras plu la uragan'
sur bluaj bluzoj jen skarлата stri',
en la okuloj — frostiĝinta kri'
kaj fumas la fusil' en ĉies man'.

Kaj malproksime ĉe l' kontraŭa flank'
ekbrilas la mitral' kun fajra fort',
alpaŝas de l' husaroj la lavang'
pafante salve; fluas sang'
kaj ŝvebas kun grandega fort' la Mort'...

Ĉe l' barikado restis nur Johan'.
Per sango aspergite apud li
mortĝemas la maljuna veteran'.
Vidinte la husarojn tra la flam' —
li morte krias: „For de tie ĉi!“

Kaj en la manoj per la kzarben',
Johan' renkontis ilin kun obstin'.
„Vi venu nur — per kor' kaj ŝtonmien'
renkontos mi la bajonetojn — jen!
Do venu nur, vi filoj de la krim'!“

Stultuloj! Ĉiu gut' de sang' el kor'
heroojn mil elŝprucos por la lukt'!
Sonoras jam dekdua venka hor'.
La regpotencon vian, de teror'
renversos ni. Kanajloj, venu nur!“

Kaj el la malamika vic'-husar'
ebria, kun koler' eksiblis jam:
„La manojn supren! Mutu sklavbastard'!“
Sed grandioza en la kontraŭstar', —
„La kapojn supren!“ — krlis tuj Johan'.

Komuna salv' reeĥis en respond'.
Li falis ĉe l' maljuna veteran'.
Alkuris la husaroj kiel ond' —
kaj unu lin rimarkis kaj per kolb'
disbatis la kranion de Johan'.

Dronadis en nebul' kaj prujn' Berlin',
krepuskis blue la matena hor'.
Kaj hejme en teruro la virin'
ĉe ĉiu pafado en la malproksim'
eksplodis en angoro, vea plor'.

Kaj atendente kun sopira sent',
ŝi la infanon premis per la man'.
Ekstere regis muta mortsilent'
kaj lipoj palaj pro la ĝemlamente'
en ploro flustris nur: „Johan', Johan'!“.

1921

Tradukis: At. Lakso

LECIONOJ POR LINGVA PERFEKTIĜO (3)

VERBO

Formoj de sendifina modo (Infinitivo) -i kaj de vola modo (volitivo, imperativo) -u.

INFINITIVO — kompletigas la sencon de alia verbo (komplemento en verba formo):
Ni volas panon. — Mi volas **manĝi**. — Mi volas **manĝi** panon.

Ni povas tion. — Mi povas **paroli**. — Mi povas **paroli** esperante (aŭ: Esperanton).

Kion vi preferas? Vinon aŭ limonadon? — Mi preferas **trinki** vinon. — Mi preferas vinon.

Infinitivo en funkcio de gramatika subjekto: Rajdi sur leono estas **dangere**. Bone, estas lerni persiste.

Volitivo (imperativo) — esprimas deziron aŭ ordonon:

Prenu la libron. Malfermu ĝin. Trovu la kvardeksekan paĝon. Legu. Fermu la libron. Rakontu, kion vi legis.

Ni komencu nian lecionon. Li venu sola. Ili sciu, ke mi ne toleros ŝercojn.

Numeraloj

Sufiksoj -obl, -on, -op.

-obl: duobla, triobla ktp. (kiomfoje estas prenata io, kiomfoje ĝi ripetiĝas).

Sesoble kvin estas tridek. — La sesoblo de kvin estas tridek.

-on: duona, duono, triona, triono ktp. (en kiom da egalaj partoj estas dividita io).

duona pomo = duono **da** pomo (t.e. ĉi **duono** esprimas mezuron; se ne estas akcentata la mezuro, la kvanto, ni diras duono **de** pomo).

-op: duope, triope ktp. (el kiom da personoj aŭ objektoj konsistas grupo, vico ktp.).

Ni restis duope. Nia duopo parolis laŭte. Ili marŝas kvarope en vico (en ĉiu vico estas kvar personoj).

Prepozicio pri distribuo: **po**. Donu al la infanoj **po** du pomoj (al ĉiu infano du pomojn).

Potage = por ĉiu tago. Pomonate: pagi kvin stelojn pomonate = pagi **po** kvin stelojn monate = pagi kvin stelojn en ĉiu monato.

Korelativaj vortetoj

k — kio, kiu, kia, kie, kiel, kiam, kiom

t — tio, tiu, tia, tie, tiel, tiam, tiom

ĉ — ĉio, ĉiu, ĉia, ĉie, ĉiel, ĉiam, ĉiom

La partikulo ĉi estas uzata kun tio, tiu, tie, kiam estas necese diferencigi objektojn, el kiuj unuj estas pli proksimaj kaj aliaj pli malproksimaj: tio ĉi, tiu ĉi, tie ĉi, aŭ: ĉi tie, ĉi tiu, ĉi tie.

Aparta kazo de mallongaj esprimoj: ĉio ĉi (ĉio ĉi tio), ĉiuj ĉi faktoj; ĉi-vespere, ĉi-homo.

Afiksoj

Prefikso: mal-: malbona, malrapide, malfermi; mala, male.

Sufiksoj: -ln: knabino, virino, patrino.

-ist: maŝinisto, telegrafisto, instruisto, esperantisto.

-et: knabeto, beleta, dormeti.

-eg: manego, grandega, ridegi.

-il: razilo, hakilo, gladilo, komprenilo.

Noto. -ist montras ĝenerale personon, kiu havas la esprimitan en la radiko profesion, sed krome, ĝi povas montri ankaŭ adepton de iu ideo aŭ movado: esperantisto, socialisto, komunisto, kalvinisto (sinonime al -an: luterano, kristano, esperantismano = esperantano, socialismano ktp.).



Vortformado

radiko + finaĵo

bon	— a
knab	— o
lern	— as
diligent	— e

Bona knabo lernas diligente.

prefikso + radiko + finaĵo

mal	— diligent	— a
mal	— bon	— o
mal	— ferm	— i

radiko + sufikso + finaĵo

patr	— in	— o
maŝin	— ist	— o

radiko + radiko + finaĵo

klas	— ĉambro	— o
------	----------	-----

Ĉe la kombinitaj (du-kaj plurradikaj) vortoj la lasta radiko entenas la bazan (ĝeneralan) ideon de la vorto; la antaŭa radiko difinas ĝian kvaliton (kiaĉcon): klasĉambro = klasa ĉambro; florgardeno = flora ĝardeno, ĝardeno de floroj (deference al fruktoĝardeno, legomĝardeno); ĝardenfloro = ĝardena floro (floro, kiu estas kulturata en ĝardenoj — difference al kampofloro, arbara floro).

Kampofloro: la unua radiko havas ankaŭ finaĵon (kamp-o) por eŭfonio (belsoneco) kaj por pli facila elparolo; oni malfacile povas elparoli „kampfloro“ (kun amasiĝo de kvar konsonantoj: m, p, f, l). Same: akvofalo (anstataŭ akvfalo) ka.

Ankaŭ en la kazoj, kiam la antaŭa vorto precizigas per sia finaĵo la signifon: unua-klasa, duagrada, unuenaskita, dufoja, duafoja ktp.

Modalecaj esprimoj

Li rapidas. Li marŝas rapide. Lia iro (marŝo) estas rapida. Li iras rapidmarŝe.

Vi legas tre mallaŭte. Via lego estas tre mallaŭta.

Elparolo kaj akcento

La lernantoj devas ekkutimiĝi jam en la unuaj lecionoj elparoli klare ĉiujn sonojn, speciale la vokalojn, sen malfortigo de apartaj, sen malklarigo, reduktio ks., ankaŭ sen longigo de certaj vokaloj.

Ĉe elparolo de vortoj formitaj el du aŭ pluraj radikoj estas bone komprenigi per la voĉo, kie finiĝas unu kaj kie komenciĝas la sekvanta radiko; tion oni atingas per mallonga ekhalto kaj per la tiel nomata duona akcento: flor-ĝardeno (post „flor“ — mallonga paŭzo, kaj „flor“ havas malfortan akcenton, kaj la ĝenerala akcento de la tuta kombinaĵo venas sur la silabo de: flor-ĝardeno).

Por kelkaj nacioj oni devas atentigi speciale la akcentadon ĉe vortoj kun finaj silaboj -io (-io, -il) kaj -toro, -oro: nacia, socio, asocio, deklinacio, direktoro, profesoro ktp.

Ekzemploj kaj tipaj frazoj

-i: Voli, estas povi.

-u: Ne diru „hop“ antaŭ la salto.

-obl: Rapida helpo — duobla helpo. Duoble donas, kiu donas ĝustatempe. Kiom estas sepoŝle ok?

-on: Komenco bona — laboro duona.

-op: Akiro kaj perdo rajdas duope.

mal-: Bona estas nova domo kaj malnova amiko.

-in: Kia patrino, tia filino.

-ist: Razisto raziston razas.

-et, -eg: Oni komencas per ŝteleto kaj finas per ŝtelego.

-il: Ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas.

Ekzercoj:

1. En la sekvanta ŝerca kombinaĵo difinu la bazan radikon kaj klarigu pri ĉiu el la ceteraj radikoj, kiun radikon difinas:

Sukerfabrikdirektorkabineto.

2. Kompletigu la sekvantajn frazojn:

Marko volis... vian onklon, sed via onklo ne povis...

Mi povas... nur panon, sed vi ne deziras... al mi eĉ panon.

Kiam vi komencos...?

Kiam ni finos...?

Kiam ni finos la...?

Hodiaŭ ne estas tempo...

(daŭrigota)



Deje, 8. 10. 1961

Tre karaj kamaradoj,

Pasis jam monato depost kiam ni adiaŭis ekster TABSO en Sofio kaj ni estas iom ĝenitaj, ĉar ĝis nun ni ne montris al vi vivsignon. Hejmenvenintaj, atendis nin, kiel vi certe komprenas, amaso da labortaskoj, precipe partiaj, kaj pro tio ni devis forlasi la korespondadon dum certa tempo.

La vizito en via lando kaj la renkontigoj kun la bulgaraj esperantistaj pachtalantoj restas daŭre en nia memoro, kiel iu altvalora travivaĵo. Ne-forgeseblaj estas la renkontigoj kun via belega, varma kaj ĉarma lando. La rapida konstruado de socialismo ravis nin, sed la plej entuziasmiga estis por ni la sincera korvarma kamaradeco kaj intensa interesiĝo de bulgara popolo pri konservo de la monda paco. Mult-loke ni spertis la tradiciajn bulgarajn gastigemon kaj helpemon. Ni devas konfesi, ke ofte ni hontis sciante, ke ni ne valoris tian atenton. Jes! Estis bulgara profesoro, kiu disponigis al ni — du svedaj laboristoj — sian dormoĉambron kaj li mem provizore translokiĝis por dormi en la kuirejo.

Nun ni pretigas niajn kolorfotojn. Per ili ni revas revivigi la memorindajn tagojn, pasigitaj de ni en via sunkaj kor-varma lando. Baldaŭ ni entreprenos vojaĝon al kelkajn najbaraj urboj por prelegi en sindikataj kaj esperantistaj kunvenoj pri la konstruado de socialismo en Bulgario. Ni esperas, ke la publiko restos kontenta, ĉar ni ilustras niajn paroladojn per kolorfotoj, faritaj de ni mem dum la vizito en via lando.

La 14-an kaj 15-an de oktobro k. j. okazos en Karlstado la Unua Landa Konferenco de Sveda MEM-Sekcio. En la tagordo interalie ni aŭskultos raporton de k-do K. Akselson pri partopreno de la svedaj MEM-anoj en la

kontraŭatombomba marŝo okazinta la 23-an kaj 24-an de septembro k. j. Alia grava punkto de nia konferenco estos la kunlaboro kun la MEM-anoj en Germana Demokrata Respubliko, por ke ni kune kun ili povu organizi MEM-kunvenon dum la venontjara Baltmara Pacsemajno en Rostock.

La Sveda MEM-Sekcio estas preta eldoni la libron „Heroa pasinteco“ de Canko Murgin. En ĝi ni kaj multaj aliaj en Okcidento ĉerpos el la abunda sperto de la bulgaraj esperantistoj en la batalo por paco, amikeco kaj socialismo.

Nia letero jam estas en la fino. Ni nur deziras esprimi nian bedaŭron, ke ni forveturis pli frue kaj ni ne povis vidi la celebradon de via landa nacia festo — la Naŭa de Septembro. Kun sopiro ni rememoras pri via suna lando kaj ek de nun ni komencis cerbumi, kiel aranĝi por reveni al vi kiel elbe plej baldaŭ.

8. 10. 1961

Karl KVIST,
Rosa WINDOL

NOVAĴOJ EL HUNGARIO

La 16—17 de septembro en Pécs la hungaraj esperantistoj aranĝis tutlandan renkontigon. En sunbrilaj somerfinaj tagoj kunvenis proksimume 400 geesperantistoj. En Pécs dum la festvespermango en la eleganta restoracio „Olympia“ diris salutparolon la sekretario de Hungarlanda Esperanto-Asocio Papp Zsigmond kaj aliaj personoj de la loka urba kaj faksindikata gvidantaro.

Dimanĉe matene la ĉeestantoj faris rondvojaĝon en la urbo per aŭtobuso. Oni vizitis la faman montaron Mecsek, kaj la historiajn memoraĵojn en la urbo.

La renkontigon partoprenis 22 polaj kaj bulgaraj gesamideanoj.

Dimanĉe posttagmeze la gvidantaro havis oficialan kunsidon, kie la ĉeestantoj faris raportojn kaj proponojn.

La 22-an de septembro en la gimnazio „Kossuth Zsuzsanna“ la Budapeŝta Departementa Komitato, pere de la Hungara Pedagogia Sindikato, komenciĝis Esperanto-kurso, kies gvidanto estas Julio Baghy.

DENOVE PRI LA ORGANIZA STABILIGO

Alproksimiĝas la jarkunvenoj. Dum tiu ĉi jaro laŭ decido de CK ili okazos dum decembro kaj januaro. La societoj bilancos sian agadon, analizos la sukcesojn kaj la mankojn kaj difinos la direkton de la estonta agado. La karakteriza cirkonstanco de la ĉi-jaraj kunvenoj estas la fakto, ke ili difinos la agadon antaŭ nia 35-a kongreso. Kaj eble tiu kongreso estos la ŝtupo al organizo de universala kongreso en 1963 en Sofio. Tiuj grandaj eventoj starigas antaŭ ni ĉiuj gravajn taskojn.

Ni devas utiligi la preparan laboron por la jarkunvenoj por ĉiufanka organiza stabiligo de niaj societoj. Grava elemento, signanta la organizan staton, estas la pago de la membrokotizo. La invito al pago dum ĉiu trimonato mobilizas la societan membron, lin ligas kun la estraro, memorigas pri lia membreco kaj devo al la societo. La praktiko montras, ke societoj, kiuj regule kolektas la membrokotizon, havas bonan organizan vivon. Por simpligi la kontotenadon ni enkondukis la novan trimonatan raportilon. Sed eĉ ĝin iuj estraroj plenigas malatente kaj erare. Foje en unu raportfolio oni enskribas membrokotizon por diversaj periodoj, kio malklarigas la organizan staton kaj kio ne estas permesata de la formo mem; foje oni skribas la trimonaton, en kiu oni plenigas la folion kaj ne tiun, por kiu oni pagas. Sur la raportiloj mem estas skribitaj tre klaraj indikoj pri la plenigo de tiuj simplaj raportiloj kaj oni devas priatenti ilin. De la regula kaj ĝusta kontotenado dependas la klareco en la organiza stato.

Multaj societoj montras nepardoneblan neglekton al la membrokotizo. La templimo por la pago de la membrokotizo post la tria trimonato delonge pasis (la 10-an de septembro), sed la plimulto de la societoj ankoraŭ ne pagis ĝin, en tiu nombro la societoj de

Kazanlâk, Ruse, Sevlievo, Haskovo, Bjala, Botevgrad (la informo rilatas al la 20-a de oktobro).

Pluraj grandaj kaj viglaj societoj pagis por tre malmulte da membroj, ekzemple: Burgas pagis nur por 35 membroj (ĉe plano 80), Gabrovo — 28 (plano 100), Kolarovgrad — 16 (plano 100), „M. Gorkij“ — Sofio — 137 (plano 400), Pleven — 33 (plano 80), Varna — 32 (plano 250), Pazarĝik — 14 (plano 80), Plovdiv — 160 (plano 250). Por la unua kaj la dua trimonatoj pagis apenaŭ la duono de la societoj.

Estas klare, ke ĉe tia nepardonebla maldisciplino estas embarasata la agado de la asocio, ni ne povas eldonadi propagandajn materialojn, lernilojn, ni ne povas helpi la societojn. Tio mal-kontribuas al la organiza stabiligo.

Unua tasko de la societoj estas enkonduki en la praktikon la strikte regulan pagon de la membrokotizo al la Asocio laŭ trimonatoj en la difinita templimo.

Tre grava faktoro por la organiza stabiligo estas la disvastigo de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Ankoraŭ troviĝas eĉ membroj de societaj estraroj, kiuj ne ricevas ĝin. Kaj kiumaniere ili agitos la aliajn abonintojn?! Kiumaniere ili gvidos societojn, se ili ne estas informataj pri la movado, pri la decidoj de CK, pri la instrukcioj presataj en BE? Estas tempo jam ne toleri estraranojn, kiuj ne estas abonintoj al BE. Ne nur la estraranoj, — ĉiu esperantisto devas ricevi la asocian organon, se ni deziras havi fortan, unuecan movadon. Ekde la unua de novembro daŭras la kampanjo por varbado de abonintoj por 1962. Ĉiu societo devas streĉe kaj organizite klopodi pliigi ilin. Oni devas ĉiumaniere kuraĝigi tiajn aktivulojn kiaj Dimităr Ivanov el Plovdiv, Kovaĉeva el Gabrovo kaj aliaj kiuj varbis dekoj kaj centoj da abonintoj dum la kuranta jaro. La plimultigo de la abonintoj kontribuos ankaŭ por la antaŭeniro en

la organiza konkurado por la transira flago de GK de BEA, kies rezultoj estos proklamitaj dum la 35-a kongreso en Burgas.

La regulaj kunvenoj estas firma fundamento por la organiza stabiligo. La manko de kunvenoj kaj renkontigoj, kontraŭe, disigas la anojn, malfortigas la organizaĵon. Amuzvesperoj, ekskursoj, interurbaj renkontigoj, ankaŭ kontribuas al tiu celo.

La jarkunvena kampanjo devas esti utiligata por ĉiufanka organiza stabiligo de la societoj. De tiu kampanjo, de la bona okazigo de la jarkunvenoj dependas la plua fruktodona agado. Ni ekde nun streĉu la fortojn por digna renkonto al nia 35-a kongreso en Burgas!

Violin OLJANOV
sekretario de BEA



*Esperanto kurso en
Svilencrad*



*La XVI pola esp.
kongreso en Vroclavo*

LA FAKKUNVENO DE MEM DUM LA 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La MEM-kunveno estis multe pli kontentiga ol la perspektivoj promesis. Alveninte ĉe la kongresejo mi demandis min ĉu la kunveno flaskos. Mi antaŭscis, konsultinte la kongreslibron, ke el la britaj esperantistoj, kiuj iam aŭ iel montris intereson al MEM nur du (Ges-roj Smith, High Wycombe) aliĝis al la kongreso.

Mi konsolis min, ke eble mi faros kontaktojn dum la sabato, sed tiu espero vaniĝis en tia kvazaŭa abelujo, kia estas la unua tago de Universala Esperanto-Kongreso. Nia kunveno okazis dimanĉon je la 14,30 h. en la Magistrata Salono de la Urbdomo. Samkure kun nia okazis kvar aliaj kunvenoj kaj du ekskursoj (kaj la vetero estis bela, tre aloga por ekskursoj).

Enirinte la salonon je la fiksita horo agrabla estis vidiĝo de esperantista publiko konsistanta de pli ol sesdek personoj, kaj kuraĝiga estis la konstato, ke ĉe la podio troviĝas pacaktivuloj Julio Bahgy el Hungario; Andrej Rajski el Pollando kaj Atanas Lakov el Bulgario. Tiuj kamaradoj paroladis en tiu ordo post lego de leteroj de k-do Ko-l-fan, MEM-peranto en Ĉinujo; de Lajos Marton, vic-prezidanto de MEM el Hungario; de d-rino G. G. Dazzini, Milano; (la letero de Dr. Halbedl alvenis al mia domo post mia forveturo al la kongreso).

Tiam mi metis al la publiko diskuton pri la gviddemono proponita de nia Mondpaca Esperantista Movado, „El kio konsistas la respondeco de la esperantistoj por la paco?”.

Tre vige kaj senhalte sin proponis la ĉeestantoj paroli kaj fine necesis limigi la paroladojn al triminuta daŭro, ĉar devis finiĝi la kunveno akurate je la 17-a horo — alia publiko atendis ĉe la pordo ekuzi la salonon. Inter aliaj paroladis gesroj Eichholz el Kanado; Borbala Sereni el Hungario; Prof. Nisiumi el Japanio kaj Mark Starr el Usono.

Laŭsperte, oni povas diri, ke fareda estas tio okazigi ĉe Universalaj Esperanto-Kongresoj, disputadon pri pacproblemoj, pri la respondeco de la esperantistoj por konservo de la paco. Ĉiu esperantisto sufiĉe kapabla en la lingvo,

pli aŭ malpli konscias, ke en Esperanto ni havas ilon porpaca mirinde efikopovan, se ni klarvide uzadas ĝin tiucele.

Tio estas la tasko de MEM. La plejmulto el la parolintoj substrekis, ke la esperantistaj pacbatalantoj ne sufiĉe utiligas la Internacian Lingvon en la konkreta batalo por paco, por senarmigo, kaj kunekzistado inter la ŝtatoj kun malsama sociordo. Krome oni sugestis, ke estonte oni batalu por paco ne per nuraj paroloj, sed per konkretaj agoj subtenante la pacamajn proponojn de Sovet-Unio por certigo de daŭra paco en la mondo. Inter nun kaj la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago ni devas detale pridiskuti en la paĝoj de „Paco” kaj aliaj Esperanto gazetoj tiun gviddemonon „El kio konsistas la respondeco de la esperantistoj por la paco”... Ĉe la 46-a ne trovis respondon al tiu demando. Multe el tio, kio estas dirita (kvankam interesa kaj valora) vagadis for de la temo kaj ne kontentigis la verajn batalantojn por daŭra paco.

Mi sugestas, ke ĉe venontaj kongresoj, ni starigu la saman gviddemonon „El kio konsistas la respondeco de la esperantistoj por la paco”, ĉar ĝi validos dum pluraj jaroj. Sed ni metu la aferon sur pli bone organizitan bazon. Ni havu tie MEM-anojn, kiuj povas plenkone paroli pri la esenco de la gviddemono nome:

1. Paroli interese kaj informe pri la pacagado tra la mondo.

2. Pri la neceso, ke la diversaj organizoj kombinu sian agadon por paco.

3. Pri la devo de esperantistoj uzadi nian mirindan lingvon cele al mondopaco.

4. Por forpeli la miskomrenojn kaj malfidojn, kiuj ekzistas rilate al la Mondpaca Movado, al nia esperantista flanko de ĝi.

5. Varbi por MEM.

Se niaj anoj sufiĉe vige kaj pripenseme diskutas la temon kaj ĝiajn parencajn demandojn en la paĝoj de „PACO” ni povos dece kaj trafe trakti ĝin dum la 47-a.

C. FIELDING
Britlando

TRA LA GAZETARO

En ĵurnalo „Rabotničesko delo” (13. VIII. 1961) aperis bulgara traduko de la dokumenta novelo „Patra helmo” de A. Volkov kaj N. Ŝtanko, specialaj korespondantoj de la soveta ĵurnalo „Izvestija”.

En la novelo la aŭtoroj rakontas verve pri la vivo de la dua soveta kosmonaŭto German S. Titov.

Inter alie ili rakontas, ke la patro de G. Titov — Stepan Pavloviĉ Titov estas esperan-

tisto, ke li verkis versaĵojn en Esperanto en kiuj li glorigis sian naskiĝregionon Altaĵo, ke li vaste korespondis kun esperantistoj preskaŭ el ĉiuj kontinentoj. Speciale interesajn leterojn sendis al li iuj kudristinoj el Germanio, kamparano el Japanio, instruisto el Aŭstralio.

En ĵurnalo „Zavodska pravda” (Uzina justeco) en Sofio (de 4. IX. 1961) — sciigo, ke je la 14-an de septembro 1961 la Fervojista Esperanto-Societo malfermas kurson.

Ni devas substreki la tre gravan fakton ke la esperantistoj en la ne tre granda nia urbo Kazanlâk laboras tre bone, entuziasme, laŭsisteme kaj ilia sindona laboro donas jam abundajn fruktojn. La urbo vere ne estas granda, sed la esperantista societo estas sufiĉe multnombra dank' al tiu abnegacia laboro de la tieaj kamaradoj.

La membroj de la societo „Roza Valo“ preparis tutan paĝon kun titolo „Esperanto potenca ilo por paco kaj amikeco inter la popoloj“, kiu aperis en la loka ĵurnalo „Iskra“ (Fajrero) la 26-an de aŭgusto 1961. Ni salutas elkore ankaŭ la redakcion de la ĵurnalo, kiu volonte akceptis publikigi la materialojn. Ni devas esperi ke tiu fruktodona laboro ne ĉesos, ke ĝi estas daŭrigota. La paĝo entenas jenajn artikolojn: „Ni lernu Internacian Lingvon Esperanto“ de D. Martinov, prezidanto de la societo; „De la bordo de Balta maro ĝis Kazanlâk“, kun la portreto de la plej fervora korespondanto de „Roza Valo“ — Jaan Ojalo; Vidajo el la ĉirkaŭaĵoj de urbo Krajova el Rumanio, sendita de Petre Titojju; „Letero el malproksima Japanio“, sendita de Susumi Tezuka; „El mia Esperanto-korespondado“, longa kaj tre interesa artikolo de Iv. Z. Ĵelev, kiu rakontas pri sia bonega sperto en la korespondado. La artikolo estas akompanata de

du interesaj ilustraĵoj: Bela estas urbo Talinn, ĉefurbo de Estona Soveta Socialisma Respubliko; unu el la mirindaj fontanoj en urbo Salzburgo, Aŭstrio-nokte.


Ni montras kiel modelan la agadon de la gekamaradoj en Kazanlâk, kaj la sintenon de la redakcio de la loka ĵurnalo „Iskra“ kaj ni opinias, ke tiu ĉi agado estas kaj devas esti sekvinda de ĉiuj niaj esperantistaj societoj en la lando. Krom tio ni opinias, ke tiu paĝo en „Iskra“ estas unua, sed ne la lasta. Ni estas certaj, ke la gekamaradoj trovos interesajn materialojn kaj fortojn daŭrigi ankaŭ estonte la bonegan kaj fruktodonan agadon por ke urbo Kazanlâk fariĝu centro de tia modela agado.

En ĵurnalo „Naroden drugar“ (Popola kamarado) en Jambol (de 6. IX. 1961) — informo pri la labortago de la esperantistoj en Jambol, kiuj helpis la laborkooperativan mas-trumon en vilaĝo Kabile en kolektado de prunoj kaj pomoj.

En ĵurnalo „Literaturni novini“ („Literaturaj novaĵoj“ en Sofio (de 9. IX. 1961) — artikolo „Vapcarov kaj Karaslavov tekas admiron“ kun recenzoj de „Dansk Esperanto-Blad“ kaj „Heroldo de Esperanto“ pri la romano „Bofilino“ de G. Karaslavov kaj de „La praktiko“ pri „Elektitaj versaĵoj“ de N. J. Vapcarov.

1. S.

T. Pindarev



La XXII. frapo

ORGANIZA VIVO

JAMBOL. La 20-an de septembro k. j. en nova Esperanto-klubo okazis kunveno. La prezidanto de la estraro de nia societo k-do Dimo Trudoljubov legis la raporton „Pri la ideologia stabiligo de Bulgara Esperantista Asocio“ de Hristo Gerov, prezidanto de CK de BEA,

Demandoj kaj eldiroj faris: David Hazmanaj, Donka Târpanova, Isak Koen, Angelina Penčeva ka.

La kunveno akceptis enhavoplenan rezolucion. En ĝi la kunveno esprimas aprobon de la decidoj de CK de BEA kaj deklaras, ke utiligos Esperanton por diskonigo de la grandaj sukcesoj de nia popolo en eksterlando, en la batalo por paco, por kulturaj ligoj inter la popoloj ktp.



Zlatka Sabeva helpas en la kooperativa fruktĝardeno

La 28-an de septembro k. j. en la klubejo de la Esperantista Societo „Maksim Gorkij“ — Jambol, okazis kunveno. Ĉeestis 65 geesperantistoj.

K-do Dimo Trudoljubov, prezidanto de la societo, raportis pri la internacia politika situacio.

Ĉiuj gekamaradoj unuanime esprimis sian sentrankvilon pri la atombomba milita dan-

ĝero. „Ni, la geesperantistoj en Jambol devas ĉiurime defendi la pacon, por la bona kaj feliĉa estonto de nia popolo“ — finis sian raporton D. Trudoljubov.

Pri la internacia situacio kaj pri la germana demando raportis k-do Georgi Jordanov, membro de la Distrikta Komitato de La Komsomolo.

La kunveno sendis rezolucion al CK de BEA, al la Ambasadorejo de GDR en Sofio kaj al la Pacdefenda Komitato en Orienta Berlino.

**Petja Kračeva,
Spas Kânev**

PLOVDIV. La estraro regule laboras laŭplane, dank' al kio en la klubejo estis vigle kaj interese ankaŭ dum la somero. Estis organizitaj regule ĉiumerkredaj esperantlingvaj kunvenoj. Tie ĉi oni faras prelegojn pri diversaj temoj. Tio ĉi bone kontribuas por la plia posedo de la lingvo flanke de la gekamaradoj. Krome, ni organizis ekskursojn al kelkaj historiaj kaj pitoreskaj objektoj. Dum la Tago de la Slava Literaturo kaj Kulturo — 24. 5. 1961, la esperantistoj formis specialan kolonon kun sloganoj kaj verĉaj standardoj.

Kiam alproksimiĝis la aŭtuno, la estraro komencis pensi pri la nova lernjaro en Esperanto. Rezulte, la lernjaro komenciĝis organizite kaj bone. Ni faris amasan kaj individuan propagandon. Unu el la registaro faris paroladon per Radio Plovdiv.

La 2-an de oktobro en la klubejo komenciĝis la unua kurso. Estas malfermota baldaŭ dua kurso.

Estis malfermitaj kursoj en unu lernejo en kelkaj oficejoj en la urbo. Estas malfermota esperanta kurso ankaŭ en la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio.

En Fabriko „Naŭa de Septembro“ tri junularaj brigadoj batalantaj por la nomo „Brigado de komunista laboro“ decidis unuanime lerni Esperanton. La Komsomolo kaj la sindikata gvidantaro aktive helpas. Ĉiuj eniras en du kursoj. La unua jam komenciĝis.

Hristo Petrov

LEVSKI-GRAD. Varia estis la agado de la Esperantista Societo „Vasil Levski“ en Levski-grad. Por ke la membroj ne deflankigu de la societa vivo kaj agado, oni ofte organizas ekskursojn al historiaj kaj belegaj lokoj de la Balkanmontaro.

Estis organizitaj ekskursoj al v. Rozino, al la urboj Koprivštica kaj Klisura, al la fliera pinto „Botev“, al la montodomoj „Dobrița“, „Levski“, ktp.

Iuj el la ekskursoj efektiviĝis kune kun la loka turista societo. En tiu rilato ambaŭ societoj havas laŭdindan komunan agadon.

A. Tanev

PER NOVAJ FORTOJ

Per novaj fortoj ni partoprenu en la laboro pri plifortigo de la esperantista movado inter la bulgara studentaro — tio estas honora tasko por ĉiu esperantisto-studento.

La problemoj pri la plibonigo de nia laboro en la studentaj medioj estas tre grava kaj respondeca. Multe da energio kaj junulara vervo estas necesaj por la sukcesa atingo de nia celo: plimulti niajn vicojn per novaj sindonaj kaj agemaj anoj. Tio starigas la demandon pri la studentaj kursoj. Por ke estu sukcesa unu fundamenta kurso, necesas estas bona instruisto, kiu ne devas nur konigi al la gekursanoj la fundamentojn de la lingvo, sed allogi ilin en la esperantista vivo, klarigi al ili la grandan rolon de Esperanto por la kultura elkreskado de la laborulaj amasoj. Normale kaj necese estas, ke la kursanoj estu membrigitaj al la koncerna societo. La respondeculoj pri la kursoj devas kontaktigi sin kun la komsomolaj komitatoj de la superaj lernejoj, kiuj povis kontribui al la organizado la efektiveco kaj la sukcesa fino de la Esperanto-kursoj. Ankaŭ ĉiuj studentoj, kiuj okupas sin pri la internacia lingvo, devas altiri novajn amikojn al Esperanto, rakontante pri la celo de nia movado, pri sia internacia korespondado, pri la esperantistaj vojaĝoj, ekskursoj kaj brigadoj, kulturaj manifestigoj, literaturo ktp.

La efektiveco de la kulturaj iniciatoj, la organizado de kolektiva vivo, de sistemaj renkontigoj multe helpas al ni en la varbado de novaj amikoj al Esperanto. Nia ligo kun la superlernejaj estraroj de la Komunista Junulara organizaĵo kaj kun la estraro de BEA kontribuos pri la ĝusta uzo de Esperanto je servo de studenta junularo.

En la estontaj planoj de la studentaj societoj kaj grupoj devas eniĝi novaj iniciatoj. En la societaj kunvenoj oni devas pridiskuti interesajn problemojn pri la partopreno de niaj delegitoj en la 46-a kongreso de UEA kaj de 17-a kongreso de TEJO en Britlando, pri la ĉi-jara junulara ekskurso al Gdansk (Pollando), pri la partopreno de sofiaj gestudentoj en la konstruado de la turista domo „*Esperanto*“ (en monto Vitoŝa), pri la vendado de markoj-brikoj por la konstruo de Esperantista Domo en Sofio ktp.

Jam estas tempo, ke en ĉiuj urboj de la lando, kie ekzistas superaj kaj duonsuperaj lernejoj — Plovdiv, Varna, Ruse, Sviŝtov, Târnovo kaj aliaj — estu formataj aktivaj studentaj grupoj, pri kies utila agado pli ofte ni legu informojn en „*Bulgara Esperantisto*“. La studentaj grupoj devas estiĝi avangardo de la junulara Esperantista movado.

La lernjaro komenciĝis. Kun junulara vervo ni eklaboru por penetro de la internacia lingvo en la studentajn mediojn!

At. Dimitrov

FONDUSO „CENTRA ESPERANTO-DOMO“

Unu el la plej gravaj taskoj, starantaj antaŭ ĉiuj bulgaraj geesperantistoj estas la kolektado de monrimedoj por la konstruo de Centra Esperanto-Domo. Pere de la Esperanto-societoj la plimulto de la esperantistoj ricevis markojn-brikojn, parton de kiuj oni disvendas inter siaj amikoj kaj simpatiantoj de Esperanto. Ek de nun en ĉiu sekvonta numero de „*BE*“ estos publikigitaj la nomoj de ĉiuj apartaj monnacintoj aŭ de la societoj, kiuj kolektis kaj sendis monojn.

De la 5-a numero	23,223 lv.
Bogdana Popova, Sofia	350 .
Viola Oljanov	300 .
Berta Marinova	250 .
Ivan Sarafov	250 .
Nikola Nikolov	250 .
Canko Murgin	175 .
G. Nilsson	75 .
Esperanto-societoj en:	
Pazarĝik	4,000 .
Stara Zagora	3,500 .
Loveĉ	575 .
Sevlievo	550 .
St. Dimitrov	450 .
Velingrad	350 .
Samokov	265 .
v. Trud	250 .
Batak	250 .
Sliven	250 .
Etropole	250 .
Varna	250 .
Panagjuriŝte	220 .
Klisura	205 .
v. Pordim	200 .
Smoljan	200 .
Mezdra	121 .
v. Batoŝevo	100 .
v. R. Konare	50 .
Preslav	50 .
Orjahovo	45 .
Fervojista Esp. s-eto, Sofia	250 .
En tute:	37,254 .

Konsiderante ke la kampanio oni komencis jam delonge kaj ke antaŭstaras ŝanĝo de la mono, estas necese urĝa streĉo de la fortoj por bonrezulta kvitigo de la iniciato. Nun estas sezono de plej aktiva laboro — komenco de kursoj, vigla organiza vivo, ĉio ĉi favoras la akcion. Ĉiuj kolektitaj sumoj devos esti tuj kontigitaj en Bulgara investicia banko, Sofia filio-1, konto 10/76 — Fonduso „*Konstruo de Esperanto-domo*“. Izolitaj esperantistoj, dezirantaj sendi sumojn, povus fari tion aparte per poŝtmandato rekte al Bulgara Esperantista Asocio, Sofia, p. k. 66, menciante por kio estas destinita la sumo.

Al streĉa kaj fruktodona laboro, gekamaradoj!



GEOGRAFIA REVUO, N-RO 4, JARO IV, MAJO 1961

Geografia revuo, organo de Internacia Geografia Asocio, sub redaktado de T. Sekelj, jam aperas en daŭro de kvar jaroj. Ĝi estas interesa revuo kun tre varia enhavo, kaj ĝin devas aboni kaj legi ne nur la geografoj, sed ankaŭ ĉiu ordinara scivolema esperantisto.

En la kvara numero estas presitaj kelkaj artikoloj, kiuj traktas diversajn demandojn. En la longa artikolo „Aviadile tra Afriko“ la aŭtoro A. Haverman el Nederlando rakontas pri siaj interesaj travivaĵoj en diversaj landoj de Afriko.

En la dua artikolo „La konkero de Fitz-Roy“ la aŭtoro H. Alfaro priskribas la konkeron de montopinto Fitz Roy en Patagonio (en la sudo de Argentino), kiu ĝis 2-a de septembro 1952 estis nevenkita reĝo de Patagonio, malgraŭ ĝia negranda alto — 3400 metrojn super la marnivelo.

„Kun la ajnoj de Hokajdo“ estas alloga rakonto de T. Sekelj pri la malgranda ajna popolo (ĝia nombro estas 18,000) kaj loĝas en la plej norda insulo de Japanio — Hokajdo.

En la rubriko „Libroj“ oni faras mallongajn recenzojn pri la geografiaj verkoj „Tempesto super Akonkagvo“ kaj „Nepalo malfer-

mas la pordon“ ambaŭ de T. Sekelj kaj „Sekretoj de Marestaĵoj“ de P. Giunio.

En la artikolo „Du projektoj — unu ideo“ oni rakontas pri du sciencistoj: soveta (Arkadije Markin) kaj usona (Daniel White), kiuj samtempe publikigis preskaŭ identajn — planojn pri akvovojo tra la Nordpolusa regiono.

En la rubriko „Tra la mondo“ oni donas plej diversajn informojn, ekz.: en la grandaj montaj altaĵoj oni preferas legi klasikajn verkojn, pli seriozajn kaj pli versimilajn; invado de kanguroj okazas en Novsudvelso en Aŭstralio; la Ĉina registaro decidis fari el dezertoj (Gobio kaj Taklamakano) ĝardenojn; apud la greka marbordo oni serĉas sub la maro la grandegan trezoron de la egipta Ibraĥim paŝao, kiu pereis en 1827 kiam la franca-angl-rusa ŝiparo venkis la turkan; laŭ la plej novaj informoj la Tero estas piroforma.

Nedeljka Subotič en la artikolo „Perdita en la praarbaro“ rakontas pri Raymond Manfray, kiu perdis dum 1949 en praarbaro de Amazonio.

En la artikolo „Preĝturniloj“ de G. Marin ni trovas informojn pri diversaj tibetaj preĝturniloj.

En la artikolo „Fakta densiteco de la loĝantaro“ C. Murgin donas interesajn nombrajn ciferojn pri la densiteco de la loĝantaro en la regiono de urbo Orjahovo, Norda Bulgario.

Ni rekomendas la revuon al la legantoj.

Ivan Sarafov

REDAKTA KOMITATO

Canko MURGIN (respondeca redaktoro), Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV,
Kiril DRAJEV, Simeon D. SIMEONOV, Violin OLJANOV

Korektis: P. Georgieva

Formato 71×100/16

Eldonkvanto 3000 ekz.

Adreso: Bulv. Dondukov 57, Tel. 7-46-01, Sofio, Poŝtkesto 66

Ŝtata presejo „T. Dimitrov“, filio 2 — Sofio; mendo №7568/61

DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Sofia, str. Ivajlo 13, Maria Bubeva, Irka Popova kaj Maria Bajdanova — 12-aĝaj, kun geknaboj per il. p.k. el ĉiuj landoj.

BULGARIO

Vazovgrad, str. Isperih 8, Georgi At. Stojanov (19 jara) — kun gejunuloj pri div. temoj el ĉl, per il. p.k. kaj p.m.

USSR

Ukrainio, Drogobiĉ P-4, Lvovskaja obl. Zdanova 6—12. Anna Kalaŝnikova, kun ĉiuj landoj precipe kun finlandanoj.

USSR

Odeskaja obl. Izmail, str. Lenina 9, f-ino Rjupina Julia, k. ĉ. l. precipe kun geesp.-oj de Kubo, Meksikio, Grekio, Kipro, Aŭstrio kaj Pollando.

USSR

Iĵevsk, ul. Truda 48, kv. 66, E. M. Flejs.

HUNGARIO

Homok, Döbrei ut. 10, Géza Kovács.

HUNGARIO

Szolnok, Scéchnyi-strato 19, Aleksandro Fancsali dez. materialojn por ekspozicio.

HUNGARIO

Hódmezővásárhely, Niár útza, Elisabeto Abt, instruistino, 14 jaraj geknaboj, pioniroj, per bildkartojn por junulara laboro, vivo ktp.

KOREIO

Pjeng-Jang, K. E. A., P. O. Kesto 16, Bak Cun-Hjeng pri div. temoj, interŝ. div. specajn, laŭ interkonsento, kun tutmondo. Nepre respondas.

VENEZUELA

Caracas, Apartado 2.222, B. Cova Velasquez pri diversaj temoj sendepende de la aĝo, precipe pri filozofio, literaturo kaj ekonomio.

BULGARA ESPERANTISTO

aperos monate en sama amplekso dum 1962. Jara abonkoto — 12 levoj gis la 31-a de decembro 1961 kaj post tiu dato — 14 levoj, 2 us. dol. aŭ 2 rubloj.

P A C O monata jara abonkoto 12 levoj, aŭ 2 us. dol.

Абонирането за сп. „**NUNTEMPA BULGARIO**“ за България и чужбина ще става **само** чрез пощенските станции.

За **БЪЛГАРИЯ**: годишен абонамент — 24 лв. За **АЛБАНИЯ, ПОЛША, РУМЪНИЯ, УНГАРИЯ, ЧЕХОСЛОВАКИЯ** и **ЮГОСЛАВИЯ**: год. абонамент — 13,45 лв. За **ВСИЧКИ ОСТАНАЛИ СТРАНИ**: — 24 лв.

Всички пощенски станции в страната приемат абонаменти за следните чуждестранни есперантски списания:

POLA ESPERANTISTO годишно 6 книжки, абонамент — 9,60 лв.

EL POPOLA ĈINIO годишно 6 книжки, абонамент — 4,95 лв.

VIETNAMIO ANTAŬEN MARŜAS годишно 4 книжки, абонамент — 6,40 лв.

HUNGARA VIVO годишно 4 книжки, абонамент — 16,64 лв.

Краен срок за абониране: за чуждестранните списания — 5 декември 1961 г., за „**NUNTEMPA BULGARIO**“ — 30 ноември 1961 г.

